

SCIENCA REVUO	El Vol 22
de Internacia	n-ro 3 (89)
Scienca Asocio	15. 5. 1971.
Esperantista	
(BEOGRAD, Jugoslavio)	

SKATOLO DE PANDORA KAJ ĈEVALO DE TROJE (M. HALVELIK, BORGERHOUT, BELGIO)

La freŝe aperinta Plena Ilustrita Vortaro estas epokonfara verko en multaj rilatoj. Ĝi estas honormedalo por la pacienco, la sindediĉo, la klereco de ĝiaj kompilintoj, ĉefe de Profesoro WARINGHIEN. Ĝi estas brila atesto pri la forto, la disvastiĝo, la organizo de nia movado. Ĝi estas prestiĝa paradoĉevalo por varbi novajn entuziasmulojn, konvinki skeptikulojn, rompi antaŭjuĝojn. Ni ĉiuj rajtas fieri pri tia atingajo.

Sed ni ne povas ne rimarki ke ĝi ankaŭ entenas kolosan mikspoton de vortfarada improvizado. Svarmas en ĝi tn. »sciencaj« aŭ »fakaj« aŭ »pseŭdaj« radikoj kaj afiksoj plus ties senplanaj kunmetaĵoj. Tiomgrade ke — en la nomo de moderna idolo nomiĝanta »scienco« — la malfeliĉaj vortaro kaj regularo de nia Fundamento naniĝas kaj sufokiĝas sub babela turego de grek-latinaj terminoj kiuj, malobeante eĉ sian propran vortfaradan kutimaron, surmetas nur tre supraĵan robon esperantecan.

La brila ideo de ZAMENHOF, per »skemisma« metodo raciigi kaj reorganizi ekzistantajn naciajn vortarojn, tiele ke la rezultanta planlingvo estu modelo de simpleco kaj facileco, nun jam paliĝas antaŭ esence naturisma konfuzego kiu ne nur perfidas la originan koncepton de Esperanto, sed subfosas ĝian fundamenton.

Unu hazardan ekzempleton inter centoj, se ne miloj: ek de nun oni rajtas diri kaj skribi internaciecan **gastropodoj** apud hibridan **gastropieduloj** sed, ĉar la »teknika« radiko **gastr/o** fariĝis en la praktiko tutnatura familiano de la kutima **radikaro**, estos plu neniu obstaklo por ke oni ekuzu ankaŭ novaspektan **stomakopodoj** samkiel klasikforman **stomakopieduloj**. Kio faras ĉiujfoje kvar vortojn por unu sama nocio!

Diras la ĉefkompilinto rilate al fremdvortoj: »Mi opinias efektive ke unu el la danĝeroj, kiuj minacas nian movadon, estas la esotereco de sekto refermiĝanta sur sin mem, kaj sisteme rifuzanta la influojn de la ekstera mondo« (paĝo XV). Rezulto: li »sisteme« (en vero sensisteme) enkondukis aŭ permesis la enkondukon de multaj scienclingvaj radikoj kaj finaĵoj (**eŭ/ endo/ orto/ entero/ kondr/o ot/o penta/ raki/o retro/ ribo/ semi/ sfigm/o —olog/o —oid/ —ed/ —en/** kaj tiel plu). Nu, se tio estas efektive bezona, se ni efektive devas gastigi tiun fremdularon, kial do akordi civitanecon nur al serio da elektitoj? Kial ne al la tuta, preskaŭ nekalkuleble multnombra armeo de samspecaj vorteroj greklatinaj, kiuj simile formas amason da sciencaj kunmetaĵoj, precipe en botaniko kaj zoologio: **lito/ encefal/ olig/ peri/ amfi/ blasto/ ker/ morf/** kaj tiel pli kaj tiel plu? La nunaj distingo kaj elekto ja estas nepre arbitraj, kiel diras la kompilintoj mem; la listo certe pliongegiĝos en estonta eldono, same kiel PV saltis al PIV.

Siavice deklaras Doktoro ALBAULT, rilate al la ekzemplo **kardi/**: »estas pli ekonomie kaj racie fari plian paŝon kaj noti . . . grekan radikon . . . por formi multajn kunmetaĵojn, **prefere** kun aliaj grekaj radikoj **sed ne ekskluzive** kun tiaj« (paĝo XXI — la emfazo estas nia). Estas komplete vane se li spite postulas ke la koncerna radiko estu »ne uzebla sola« ĉar ja kiu esenca diferenco ekzistas inter »nuda« radiko kia **kardi/** (=koro) kaj »vestita« radiko kia **gastr/o** (=stomako)? Aŭ inter jam civitana **dukt/o** kaj ankoraŭ novica **siringo/**? Kaj se **otomio** formas memstaran elementon en **laringotomio** k.s., kial ĝi do ne farus same en **anatomio** ks. aŭ kial ĝi frue-malfrue ne iĝus memstara same kiel jam faris ekzemple **sekci**?

Tiele: kiam iu **esperantologo** interesiĝus ŝatokupe pri **gastropieduloj**, kial do ne iu boksisto povus ekhavi **cefaldoloron** pro batego kontraŭ la **stomato**? Aŭ kial ne iu amanto eksentu **kardipremon** vidante sian amatinon suferi je stranga **ventralgio**? Ĉar ambaŭ vortspecoj, fundamenta kaj fakscienca, estos uzeblaj kaj baldaŭ uzotaj, tiel aparte kiel en ĉiuspecaj hibridaj miksaĵoj, senorde kaj senplane, kiel demonstras elokvente la aktuala ĵargono teknologia, ekzemple en la angla lingvo: **washomatic, linotyp, dryography, photo-screening**, kaj tiel plu. Kio restos de la fidinda, skemeca principaro? . . .

Ja, se nek la kategoria regularo de ZAMENHOF, nek la iama dekreto pri tabua »netuŝebleco« kapablis malhelpi transiron de tn. »neologismoj« el la tendaro de aparteca beletro en tiun de ĝenerala, ĉiutaga prozo (**pigra, lanta, poka, olda** ks.) kiumaniere oni do kapablus ŝirmi sin kontraŭ tiu lavango de greklatinaj radikoj kaj afiksoj, sen posedo de almenaŭ reguliga instrumento? Dume, kiel supre dirite, ankoraŭ enpenetris nur elektita, taĉmento, ĉar antaŭ la pordego de Esperantujo malpaciencaj vastega divizio da pliaj greklatinuloj, malpli »gravaj« sed same potencaj por estigi konfuzon.

Kiu instanco diktos aŭ kapablos dikti, manke de strikte difinita regul (ar)o, al estontaj lingvouzantoj, precipe al nepre varbotaj sciencistoj, kiu kunmetaĵo estos akceptebla kaj kiu ne? La »kutimo« estas ege malfirma kaj malsekura gvidilo en tiu rilato, nura beletikedo kaŝante hazardon kaj kapricon. Estas ne ĝi kiu konsistigos protektilon kontraŭ la impetega invado de »sciencaj« radikoj kaj sufiksoj. Ne ĝi kiu konservos la lingvon »pura«; kiu igos la vortojn facile diserigeblaj kaj kompreneblaj sen konfuzo, ankaŭ al gentoj ekster la eŭropa kultursfero.

Paradokso estas ke ĝuste aŭtoritatuloj de nia movado, eminentaj reprezentantoj de nia Akademio — tiu respektinda bastiono kiu supozate gardas fidelecon kaj ortodoksecon inter la samideanaro — sapeas kaj senarmigas la principon de »netuŝebleco«, anstataŭigante ĝin per danĝeriga kaj multe pli dogmeca principo de senmetoda, sanregula kaj do fakte tre naturalisma konformiĝado al internacia »tradicio«.

Ni ne rajtas kulpigi la Majstron ke li ignoris, neglektis aŭ subtaksis la minacon de greklatinaj terminoj, nek ke li rezervis por ili unu solan mizeran reguleton, la agacan 15-an, kiu fakte ne estas preciza kaj klara regulo sed nur tre ĝenerala kaj senspecifa konsilo: »ĉe diversaj (—fremd—) vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto« . . .

La tasko laŭplane reformi por ĉies uzo ordinaran, ĉiutagan vortaron kaj poste efektiviĝi tutmondan movadon, kiel faris ZAMENHOF, estis pli ol sufiĉa programo por unu homa vivo. Detala kaj ĉionampleksa analizado kaj organizado de faklingvaj terminaroj restis eksterordinara problemo. Krome: sciencaj kaj teknikaj nomenklaturetoj ankoraŭ ne ludis en lia epoko tiun superregan rolon kiun ili ludas en la nuntempa epoko, kaj ilia influo eksterdube eĉ konsiderinde multobligos estontece. Do, ke ĉi-maniere Ludoviko Lazaro postlasis al ni, inter sia spirita heredaĵo, ankaŭ tiun timigan greklatinan skatolegon de Pandora, neniel difektas la geniecon de lia verko.

Ne, ni devas kulpigi, se enture pri kulpo povas esti parolate, la respondeculojn kiuj tiel senpripense kaj senprezare, tiel senplane kaj senage, malfermis tiun lupfantoman skatolon. Kaj ni precipe devos kulpiĝi nin mem se ni kliniĝos, kune kun niaj Akademianoj, antaŭ la fatalo de nacilingvaj premejoj kaj praktikados daŭre saman struto-politikon.

Estas cetere signifoplena sinkontraŭdiro en la principoj kiuj gvidis Profesoro WARINGHIEN dum la preparlaboroj de lia ĉefverko (Vd »VORTARIS-TAJ PROBLEMOJ« en ESPERANTO 1970/163). Koncerne al la **semantika flanko** de la vortarego, li penege kribris, ĝustigis, kompletigis aŭ eĉ entute ŝanĝis — konfesende kun admirinda rezulto — difinajn tekstojn kaj modelajn frazojn; kio estas **aktiva** kaj arbitra interveno. Koncerne al la **terminologia flanko**, li kontraŭe akceptis kaj registris sen kontrolo kiom eble plej multe da troveblaj aŭ proponataj vortoj, maturaj kaj nematuraj, taŭgaj kaj maltaŭgaj, eĉ unu apud alia; kio estas **pasiva** kaj blinda konduto. Jen do du mezuriloj kaj du pesiloj anstataŭ unu. Tamen, por citi nur unu ekzempleton, estintus al li tre facile noti »**ascendi/ascendo**« anstataŭ »**ascendi/ascensio**«.

Se vortaristo efektive rajtus ekskluzive nur registri tion kio en la lingvo troviĝas, tiam ja devus fari same ankaŭ rilate al difino de la vortoj. Kio verŝajne validas por natura lingvo, nepre ne validas por planlingvo, ĉar — ke la Profesoro tion deziru aŭ ne — PIV estos kaj restos, same kiel ĝia antaŭulo, kvazaŭ biblio aŭ korano. Se tiu aŭ alia vorto en ĝi troviĝas, ĝi ankaŭ sambate fariĝas akceptinda kaj akceptita, precipe se neniuj signoj aŭ simboloj avertas la leganton. Kaj estas nek ofte ripetataj deklaroj pri nura kompilada karaktero de la verko, nek averta enkonduko kiu ŝanĝos la situacion kaj la konsekvencojn!

Nepre ne temas tie ĉi pri pledo por flankenŝovi greklatinajn terminojn kaj por returneniri al ordinara, ekskluzive fundamenta vortuzo: La grava rolo kaj la neceso de sciencaj nomenklaturetoj apartaj estas ja ne ignoreblaj! Sed temas pri serioza averto kaj protesto en la nomo de ĉiuj »ĝisostuloj«. **Temas pri provo vekti la dormantojn kaj konvinki ilin ke estas urĝa tempo starigi iun lingvan kontrolsistemon, iun specialan leĝaron por asimili la barbaran hordon de greklatinaj atakantoj ordoplene: tiele ke ili obeu kaj servu al ni kiel faras »ordinaraj« radikoj kaj afiksoj, anstataŭ disrompi al ni la spinon.**

Ĉar se tiu epokonfara Plena Ilustrita Vortaro de SAT estas prestiĝa paradoĉevalo, ĝi ankaŭ aperas kiel tre danĝera Ĉevalo de Troje...